I. F. E. A.
ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N° 5 kaj 6 Majo kaj Junio 1960 10-a Jaro

## LA 12-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO - KONGRESO

HELSINKI (Finnlando)-11 ĝis 16 junio 1960

Adreso: Helsinginkatu 6 B 50, Helsinki-Bankkonto 60264 PYP Pohjois-Haaga, Helsinki

INFORMILO n-ro 4 ĜENERALAJ INFORMOJ

Vojaĝprezoj: Ŝipbiletoj de Stokholmo al Turku kostas: kun kajuto 1-a kl. 80 Sv.kr kun kajuto turista kl.60 Sv.kr. sen kajuto ferdeka kl. 35 Sv. kr.
Ŝipbiletoj estas mendataj kiel estas klarigite en "Internacia Fervojista n-ro 3. Ĉiuj, kiuj volas uzi "Esperanto-grupvojaĝo", ekveturos de Stokholmo la 10-an de junio, ricevos 20 % rabaton. Grupojn oni formas en Stokholmo, kie oni povos pagi ĉiujn menditajn ŝipbiletojn.

Monŝanĝejo: En la Ĉefstacidomo estas malfermita sabate inter la 8,30 kaj 14-a horo, kaj en labortagoj de la 8,30 ĝis 16-a horo. Bankoj estas malfermitaj sabate de la 9-a ĝis la 13-a kaj dum labortagoj de la 9,30 ĝis la 15-a horo.

Poŝtoficejo: En la dua kongrestago funkcias provizora poŝtkontoro en la kongresejo. En tiu tago sendota poŝto estos ŝtampata per speciala poŝta stampo. Ĝi estos memoraĵo pri nia kongreso kaj samtempe kontentigos niajn filatelistajn samideanojn. Por tiu okazo aperos ankaŭ speciala koverto.

Glumarkoj: L.K.K. eldonas kongresan glumarkon. Folio po 10 ekz. kostas 1 respondkuponon aŭ 40 Fmk. Mendu tuj ĉe la L.K.K. kaj uzu ilin propagandcele.

Esperantlingva komedio: En la kongreso la amatora Kultura Societo "Branko Gvetkovic" el Jugoslavio prezentos la komedion "Mande" de Mariam Drizic.

## ANTAŬKONGRESO EN HALLSBERG

Okaze de la kongreso en Helsinki la Sveda sekcio aranĝos antaŭkongreson en Hallsberg dum la tagoj 7-9 de junio 1960. La kosto estas 5 Sv. kr. kiujn vi pagos samtempe kiam vi anoncas vin al S-ro Ragnar Elofsson, Västa Gatan 2. Örebro. Svedio laŭ maniero: 1)Poŝtĝira konto 100671 Örebro; 2) Per bankĉeko al "Örebro Sparbank" bankkonto 168336, Bonvolu sciigi ĉu vi estas viro aŭ virino (por loĝado). Partoprenantoj loĝos private ĉe kolegoj, kaj la unuaj aliĝantoj havos eblecon loĝi ĉe esperantistoj. Bonvolu ankaŭ, se eble sciigi al ni vian alven-kaj forirtempon. Ni ne faris specialan aliĝilon.
La limtago por aliĝi estas la 15-a de majo.

## FINNLANDO VOKAS

Post la 12-a I.F.E.F. - Kongreso en Helsinki, Esperanto-Instituto de Finnlando aranĝos la 19-6-1960 Someran Ekskurson per moderna motorŝipeto de la urbo LAHTI al la urbo HEINOLA kaj kunlige kun ĝi Studkunvenon en Sporta Instituto en Pajulahti dum la tagoj 19 ĝis 23-6. Tie ni en amika rondo studos kaj interparolos en Internacia lingvo sub gvidado de la estro de Esperanto-Instituto, magistro Vilho Setälä. Ĉar la Sporta Instituto situas apud lago, estas eble naĝi, remi en boato kaj praktiki ĉiuspecajn sportajn ekzercojn. Ankaŭ estas eble ekhavi unikan sporton en finna ŝvitbanejo. La studkunveno okazos en tre bela Sud-Finnlanda lagregiono.

La kotizoj estas jenaj: 1.000,- Fmk. por ekskurso kaj 5.000,-Fmk. por studkunveno po persono. La prezo por studkunveno inkludos veturon en aŭtobuso de Heinola al Pajulahti, loĝadon kaj manĝojn en Sporta Instituto de vespero 19 ĝis vespero 23.

Samideanoj ! Se vi venos al Finnlando en Somero 1960, kaptu la okazon partopreni en nia studkunveno. Estu varme bonvenaj. Informu al ni baldaŭ pri via eventuala aliĝo. ESPERANTO-INSTITUTO de Finnlando, adreso Männikkötie 5 M 67, Helsinki.

F I N N L A N D O - EK AL MALPROKSIMA NORDO !

Finnalndo, nia ĉi-jara kongreslando, la paradizo de miloj da lagoj, la lando de la meznokta suno, de diligentaj homoj kaj de intensiva rekonstruado nin atendas por konatiĝi al ni la problemojn de la Eŭropa nordo. Favora okazo, ni utiligu ĝin !

Finnlando havas 337.000 km$^2$, kiuj estas kovrataj 10 % de lagoj aŭ riveroj kaj 60% de arbaroj. Ĝia longeco estas 1150 km. gia larĝedo ĝis 600 km. Kaŭze de la golfa fluo la mezgrada temperaturo estas 6 gradojn pli alta ol en samaj latitudoj eksteeŭropaj. En Somero la temperaturoj eĉ en Laplando, norde de la polusa cirklo, atingas 30 gradojn. Je la 70 grado norda latitudo la noktomeza suno seninterrompe brilas de mezo de majo ĝis fino de julio.

Kvar kaj duono milionoj da enloĝantoj vivas en la lando, el kiuj 91 % regas la finnan kaj la resto la svedan lingvon. Preskaŭ la tuta enloĝantaro estas luteraj protestantoj. Proksimume la duono laboras en la terkulturado, 20 % en la industrio, precipe en ligno-kaj paperindustrioj.

En la 12-a kaj 13-a jarcentoj la finnoj kristaniĝis kaj ŝtate fandiĝis kun Svedio por 600 jaroj, Svedio traktis la landon kiel liberan parton de la komuna tereno, kaj sekve Finnlando evoluis en libera spirito. La unua finna universitato estas fondita en 1640 en Turku, la tiama ĉefurbo. En 1809 dum la Napoleonaj militoj oni disigis Finnlando de Svedio kaj aligis ĝin al la Rusa imperio. Nur en 1917 Finnlando akiris sian ŝtatan memstarecon, kiun ĝi kapablis konservi ĝis nuntempo spite al naciaj malbonŝancoj kaj severe minacaj danĝeroj. Finnlando estas demokrata respubliko kun libere kaj sekrete elektita parlamento. Ĝi estis la unua Ŝtato en Eŭropo, kiu donis al siaj inoj plenajn politikajn rajtojn. Ni memoru, ke komponisto kiel Sibelius estis finno.

Pri Helsinki oni donos informojn en la kongreslibro. Pro tio ni ŝparu vortojn pri ĝi. Sed ni iom okupu pri la diligenteco kaj la morala forto, helpe de kiuj la finnoj sukcesis rekonstrui sian detruitan landon post la milito. Finnlando perdis vastajn regionojn al Sovjetunio.

La progresoj de la lando estas okulfrapaj. Helsinki, la ĉefurbo de Finnlando duobliĝis la enloĝantaro al nun 440.000 Dum la jardekoj la nacia produktaĵo kreskis je pli ol 50 % . La produktoj de la metalindustrio kaj de akvoelektrejoj eĉ triobliĝis. En Mez-Finnlando kelkaj akvobarejoj kaj hidroelektraj instalaĵoj transformis la terenon de la rivero Oulu. En Laplando la rivero Kemi same funkciigos multnombrajn elektrejojn.

Ĉiu finno estas fiera pri la centra stacidomo de Helsinki, kiu interne kaj ekstere estas modelo de moderna arkitekturo. Ĉiuj tabuloj en la stacidomo estas kvarlingvaj: finne, svede, germane kaj angle.

ESPERANTA TAGO EN MANTOVA

Dimanĉo la 8-an de majo okazis en Mantova, la esperanta tago kun partopreno de Esperantistoj de Lombardia, Venecia kaj Emilia regionoj.

Multnombraj alvenis frumatene la samideanoj el tiuj urboj: Bologna, Carpi, Cittadella, Ferrara, Milano, Mirandola, Modena, Padova, Parma, Reggio Emilia kaj Verona. Estis 170 samideanoj, krom la Mantovanoj, kiuj vizitis la mirindajn belaĵojn de la duka urbo de la familio Gonzaga. La Esperanto Grupo el Bologna estis la plej multnombra; krom dekoj da partoprenantoj kiu alvenis fervoje; speciala aŭtobuso grupiĝis la Bolognajn samideanojn kun la Modenaj. Inter la partoprenantoj ĉeestis multegaj Fervojistoj Esperantistoj, membroj de nia Asocio gvidataj de nia Prezidanto. Post la renkontiĝo de la geesperantistoj ĉe la kafejo "Borsa" (sidejo) de la Mantova Esperanto-Grupo), ni vizitis matene la Bazilikon de Sankta Andreo, la Katedralon, la Dukan Palacon k.t.p. majstre kaj kompetente gvidataj de la lokaj Esperantistoj. venis manĝon ĉe

luksa restoracio. Posttagmeze ni vizitis la Palacon "Te" kaj poste ni kunvenis ĉe iu kafejo kie oni babilis kaj donis al la estroj de la Mantovo Esperanto-Grupo la dankojn kaj la salutojn de la partoprenintoj per mallonga parolado de la delegitoj de la diversaj grupoj. Ni ĉi tie denove dankas ankaŭ je la nomo de I.F.E.A. al la Mantova gesamideanoj kaj al la estroj Prof. Bardini kaj S-ro Zacchè.

## XXXI-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

Cortina D'Ampezzo - de la 10-a ĝis la 16-a de Septembro 1960
Sekretariejo: Azienda Autonoma di Soggiorno - Cortina D'Ampezzo

La detala programo ne estas ankoraŭ preta, sed estas jam antaŭvidataj interesegaj manifestacioj en la Glacia Stadiono, honore al kongresanoj, flanke de la loka turisma entrepreno; kaj pluraj aŭtobusaj ekskursoj trans la Dolomitaj paŝoj kaj aliaj interesaj eroj de la programo. Sed krom la spektakla kai folklora parto la kongreso meritos partoprenon por aliaj gravaj motivoj ĉar estos Jubilea, okazinte dum 1960 la kvindeka datreveno de la Itala Esperanto Movado kiu naskiĝis oficiale dum la 1-a Nacia Kongreso en Firenze dum 1910.

La kongreso estos Nacia-Internacia ĉar al tiu solenaĵo partoprenos multnombraj eksterlandaj delegacioj. La kongreso pritraktos kaj submetos al la nacia atento kaj al la atento de naciaj oficialaj Organoj, du temojn de granda graveco: Esperanto en la lernejo kaj Esperanto en la gazetaro. Pro tio kaj por la unika kadro kie okazos l la manifestacio ni povas atesti ke la 31-a estos kongreso al kiu oni devas nepre partopreni. Do, ĝis revido en Cortina D'Ampezzo.

## FACILIGOJ PRI VOIAĜO AL EKSTERLANDO FAVORE AL EMERITA FERVOJA PERSONARO

Dum la antaŭaj renkontoj, okazintaj en Napolo: majo 1958 kaj en Amsterdamo: oktobro 1959, de la reprezentantoj de Eŭropaj Fervojaj Administracioj aliĝintaj al "Groupement pour les facilites de transport internationales du personnel des chemin de fer" (Grupiĝo por faciligo de internacia transportoj de fervoja personaro); la Itala Ŝtata Fervoja Administracio, danke ankaŭ al petoj de Fervojaj Sindikatoj, aliĝis al la propono daŭrigi la plej parton de la faciligoj por eksterlandaj vojaĝoj, koncesitaj al la deĵorantaj fervojistoj, ankaŭ al la pensiuloj.

Oni atingis en internacia kampo la jenajn konvenciojn:

A) Ebleco, por la pensiitoj, peti la internaciajn "permis" por si mem kaj iliaj gefamilianoj ĝis tri monatoj post ilia emeritiĝo aŭ peti la plibongigon de la valido de la jam ricevitaj internaciaj "permis" ĝis ses monatoj post tiu dato.

B) Koncesio, al la pensiito kaj al lia edzino de la internacia karto de "legitimation", valida por ricevi senmonbrajn eksterlandajn vojaĝbiletojn kun la rabato de 50 %.

La lasta ebleco estas valida por ĉiuj Fervojaj Administracioj aliĝintaj al F.I.P., escepte la Franca, kaj estas valida ekde la 1-a de aprilo 1960.

La "legitimation"-karto estas simila al tiu kiun nun ricevas la deĵorantaj fervojistoj, kaj, kiel ĝi, presita kvarlingve; en la mezo de la unua paĝo estas presitaj du vertikalaj ruĝaj strioj. La presado de la dokumento okazos laŭ la modelo donita de la Svisaj Federalaj Fervojoj kiel administrantoj de F.P.I.

## 45-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

BRUSELO: 30.VII-6.VIII 1960

KUNLABORO DE LA BELGA ESPERANTISTA FERVOJISTA ASOCIO (B.E.F.A.)

A - ĜENERALAĴOJ:

1) La akceptado de la kongresanoj alvenontaj fervoje estos centralizata en la Brusela Centra stacio. Tiu ĉi estas situata tuj apud la kongresejo "Kongrespalacoj". Pro la lokaj fervojaj cirkonstancoj estas la plej bona solvo de la akcept-problemo.
2) La B.E.F.A. zorgos pri la ornamado de la stacio, finance helpata de la Kongreso.
3) Esperantistaj Fervojistoj estos je la dispono de la alvenontoj en la informejo.
4) La kongresanoj ĝuos de 25 % da rabato sur la Belga Fervojreto. Plua rabato estas demandata por la eksterlandaj pensiitaj fervojistoj.

- FERVOJISTAJ TAGOJ - 3-a kaj 4-a de Aŭgusto 1960

Iĝis kutimo dum la Universalaj Kongresoj organizi specialan fakan renkontiĝon de I.F.E.F. Ĉi jaro estas la B.E.F.A. kiu respondecos pri tio.

P R O G R A M O          Merkredo la 3-an de Aŭgusto

8-a h. A) Kunveno en la giĉethalo de la Brusela Centra Stacio.
B) Disdono de la specialaj dokumentoj. C) Vizito de la Staciaj instalaĵoj.

10-a h. Forveturo per speciala trajno al Schaerbeek apud Bruselo (Senpage por ĉiuj)
Vizito, laŭdeziro, al la formadejo, signalregadejo, riparejo. Pluraj gvidantoj.

13-a h. Tagmanĝo en la kantino (20 FR.) - 14-a h. Reveturo al la Centra Stacio.

15-a h. Publika Fakkunveno en la Kongresa kinejo : 1) Malfermo - 2) Salutvortoj - 3) Transdono de la rememoraĵoj al la landaj delegitoj - 4) Prezentado de la fakaj kolorfilmoj A) La Belgaj fervojoj B) Fervojoj kaj lingvobaroj C) Prizorgado de la Belgaj Fervojistidoj.

18-a h. Vespermanĝo en la "Taverno" de la Centra Stacio - Agrabla kunesto kaj dancado.

Ĵaŭdo la 4-an de Aŭgusto :

La kongresanoj povos partopreni al la fervojaj ekskursoj de la Kongreso. La Fervojistoj ne devos pagi la fervojan parton kondiĉe ke ili mendu siajn biletojn al la findestino de tiuj ekskursoj. 1) Mezepoka Bruĝo kaj sunplena Marbordo (300 FR.)
2) Mondhaveno Anverpeno kaj ŝipekskurso sur la Ŝkeldo(250 FR.)
3) Vagado tra Bruselo kaj Ĉirkaŭaĵe (70 FR.). 1) kaj 2) nur por kongresanoj kaj 3) Por ĉiuj.

La tuta aranĝo de la 3-a de Aŭgusto estos subvenciota de nia fervoja societo pere de la Belgia F.I.S.A.I.C. Tiu subvenciado plue permesos la senpagan akcepton (tranoktado 3 ĝis 4/8 plus manĝado 3 kaj 4/8) de 19 I.F.E.F. delegitoj, unu el la ĉefestraro kaj unu el ĉiu landa I.F.E.F. filio. Tiu rilataj invitoj estis senditaj al la diversaj landaj estraroj. Krome, ĉiu partoprenanto senpage ricevos specialajn dokumentojn kiel rememoraĵo al tiuj bruselaj fervojistaj tagoj en la 45-a universala Kong.

Per la Publika Fakkunveno de la 3/8 je la 15-a horo la befa celos montri la valoron de Esperanto, en la servo de nia fako, al samfakaj ne-esperantistaj kompetentuloj kiuj tiu okaze estos invitotaj.

HOTEL ESPERANTO. En la diversaj gazetoj de la Esperantistaro oni ofte vidas reklamojn de Hoteloj kaj pensionoj kies estroj esperas tiamaniere allogi kaj enlandajn kaj eksterlandajn Esperantistojn. Subteno de tiuj reklamoj estas grava, sed plejparte ĝi estas afero de komerco kaj la reklamantoj nek parolas Esperanton nek havas ian intereson en ĝi.

Sed en Cervia, Italujo, malfermiĝis lastjare Hotelo kiu eble estas unika. La estro, ano de la Ravenna-Grupo, vere kredas je Esperanto, kaj kun granda entuziasmo nomis sian Hotelon "Hotel Esperanto", kaj li uzis la verdan stelon per la hotelinsigno.

Cervia estas marborda urbeto ne longan distancon for de Rimini, kiu situas ĉe la. Adriatiko. La malnova urbeto mem, la bonaj butikoj kaj Hoteloj, la pura sablo kaj la granda nombro de ombrodonantaj arboj sufiĉe allogas.

Se vi ferios ĉe la Adriatiko en Italujo nepre restu en la Hotel Esperanto, viale dei Mille 70, Cervia. Mi certiĝas vin, ke ĉio estos laŭ via gusto.

A.E.N. Anglujo

RADIO ROMA - Esperanto-Fako - Casella Postale 320 - ROMA (Italia)
DISSENDOJ EN ESPERANTO - JARO 1960 - Ciujn merkredojn: Kuriero de Esperanto
JUNIO 1960-a vendredon la 3-an : La Internacia Specimenfoiro de Milano - mardon la 7-an: Tra la literaturo - vendredon la 10 -an : Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 14-an : La Itala verkisto Orio Vergani - vendredon la 17-an : Novaĵoj el Italujo - mardon la 21-an : Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 24-an la socia poezio de Ada Negri - mardon la 28-an : Grandaj Sanktuloj : Sankta Vincento de Paul.

LA FAKESTRO : L. MINNAJA